**La babiladaj rondoj** okazos vendrede je la **19h30**
La gastiganto preparas mem simplan manĝaĵon (manĝon kaj deserton). La invitatoj alportas **nur** trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. Je la fino, ĉiuj donacas monon al la gastiganto por partopreni al liaj elspezoj.
Okaze de kunveno ĉe Espace Dickens, ĉiu kontribuas ankaŭ al la lupago.

**"Ambaŭ grupoj"** ĉe Espace Dickens :
la **24-an de februaro** (organizota de Knud kaj Marie-Antoinette)
la **24-an de marto** (Rosario) - la **21-an de aprilo** (Monique kaj Ĝiulio)
la **19-an de majo** (Françoise P.)

**"Okcidenta":**

**la 20-an de januaro**
ĉe Rosario Scopelliti
Ch. de Barberine 6, Lausanne
021 648 76 44 / 079 264 41 08

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd

**"Orienta":**

**la 17-an de februaro**
ĉe Maryse Tissot
Rte de St-Légier 20 A, Vevey
tél. 079 408 71 76

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6


## Laŭzana Esperanto – Societo
ĉe F. Randin – ch. de Valombreuse 14 * CH – 1004 LAUSANNE
+41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
www.facebook.com/societedesperanto.lausanne
Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 – Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

februaro 2017 – n° 02

**Lunde, la 6-an de februaro je la 20-a**
ĉe Espace Dickens (Dickens 6) en Laŭzano

## Ĝenerala Asembleo

**Lunde, la 6-an de marto**
*Karlota kaj Toos rakontos sian novjaran restadon en Germanio.*

**Lunde, la 3-an de aprilo**
*Diskuto pri "falsaj amikaj vortoj" en esperanto.*

**Lunde, la 1-an de majo**
*Decidota.*

**Sabate, la 17-an de junio**
*Ekskurso.*

福

*Feliĉo postulas*
*akcepton de la aliaj,*
*simplecon de la koro*
*kaj miron de la spirito.*

Dugpa Rinpoché

## Novaĵoj

- Je la 17-a de decembro ĉeestis 18 membraj partoprenantoj al la kutima Zamenhofa Festo. Ĉijare ni renkontiĝis en la Komuna Gastejo en Epalinges. Nia Prezidanto salutis nin ĉiujn kaj rememorigis la celon de nia renkonto. Li rememorigis, ke venontjare okazos la 100-a datreveno de la morto de L.-L. Zamenhof. Post kiam ni decidis la datojn de niaj vintraj kaj printempaj renkontiĝoj (kunsidoj kaj babiladaj rondoj), ni tre agrable fonduis kaj diskutis en amikega etoso.

- François Randin, nia sekretario, vojaĝis lastseptembre dum 11 tagoj tra Francio por paroli pri Esperanto al ne Esperantistoj. Tio estis sur invitado de Yves Nicolas, kiu regule organizas prelegojn en diversaj francaj E-kluboj. François veturis trajne pli ol 4000 km por renkontiĝi kun E-istoj en 9 urbojn kaj malkovrigi la lingvon al novaj homoj.
La renkontiĝoj estis tre afablaj, tre agrablaj, sed bedaŭrinde la aŭskultantoj estis tre malmultnombraj... Verŝajne, la reklamo estis malsufiĉa kaj mankis bona preparado de la kluboj... Tamen ni gratulegas François pro lia bonvolo kaj energio en tiu ago.

Tiu-ĉi teksto estis legata per Rosario dum nia Zamenhofa festo :

## Dependas de via koro



Vi pensas pli per via koro ol per via prudento.
Vi rigardas per via koro al la homoj kaj al la aĵoj.
Vi ĉion vidas per via koro !
Dependas de via koro la rilato kun via ĉirkaŭaĵo.
Kion via koro deziras, vi defendos per via tuta prudento kaj per ĉiuj viaj fortoj.
Via koro elektas la homojn kaj la aĵojn, por kiuj vi volas vivi !
Via koro elektas la ideologion, la politikon, la sistemon, por kiuj vi volas vivi !
La koro mallumigas aŭ lumigas la prudenton.
La ĵusta normo por la koro estas : « amo ».
Se via koro plenas je egoismo kaj malfido, via prudento neniam trovos la vojon al la paco.
Tio cetere estas la nura klarigo por la fiasko de ĉiuj rondaj kaj verdaj tabloj, de senfinaj priparoloj pri paco en la mondo.
La homoj ne amas unu la alian kaj ĝuste tial ili neniam akordiĝos.
La nura atingaĵo estos ŝanceliĝema ekvilibro de potenco,
bazita je reciproka malfido;
oni silentu pri paco, tiom longe kiom tio ne signifas pli ol internacia timoprena kunvivado en kratero de vulkano, aŭ strećita kunpremado sen amo en la sama lando, la sama domo !
La ĝojo kaj la feliĉo en la mondo ne estas aferoj de la prudento sed estas afero de la koro !
Ĉiu komunumo, ĉu kristana aŭ socialisma, ĉu komunisma aŭ maŭisma, estas putra ĝis en la radiko, tiom longe kiom la koro de la homo ne estas purigita !
La unua tasko por ĉiu homo estas :

KULTURO DE LA KORO !

*(Eltiraĵo de « Ŝanco por feliĉo » de Phil Bosmans)*

## Kalkulludo aŭ Ludkalkulo...

Eble de tempo al tempo vi kartludas. Kaj vi uzas ludon da 36 kartoj. Imagu la oftajn okazaĵojn kiam oni ludas "jass-n" inter 4 partoprenantoj.



Nun imagu kiom da eblecoj ili havas ricevi malsamajn ludojn en la manon, ĉiu po 9 kartoj. Provu kalkuli, aŭ se estas tro malfacile, proponu proksiman solvon... Oni parolos pri tio en la venonta informilo.